Kontaktu la redakcion: ✉ kunfluo@proton.me + 31 6 19 46 48 37 aŭ @kunfluo


# Kunfluo

ĉiutaga informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj
BET-59 · Kaŭno, Litovio · 5–13 julio 2025

**n-ro 6** hodiaŭ: 17 °C morgaŭ: 19 °C ĵaŭdo, la 10-a de julio 2025


## RAPORTOJ

### Pluve sed gaje en la tuttaga ekskurso

Vilkaviŝkis, al kiu ni eskursis hieraŭ, estas bela marĉa regiono proksime al la landlimo kun Pollando. Ĝi estas natura rezervejo kun propra muzeo kaj ankaŭ ĝin ni vizitis. Poste ni iris per buso al la proksima glaciaĵ-farejo *Art Glacio*. Verŝajne temas pri hazarda esperantaĵo, ĉar ja la vorto "glacio" havas alian signifon ol "glaciaĵo", ĉu ne? Nu, sed pri tio ni ne multe pensis, ĉar oni regalis nin per speciala glaciaĵ-torto kun artfajraĵoj. La sekva programero estis vizito al la palaco Paežeriai kun la apuda bieno, kaj kun interesa ekspozicio de roboj laŭ diversaj mod-stiloj. Nia grupo konsistis el preskaŭ 50 personoj. La tutan tagon pluvetis aŭ pluvis, feliĉe plej forte nur kiam ni revenis al Kaŭno, sed malgraŭ la pluvo ĉiuj ŝajnis gajaj kaj kontentaj.

**Nina Pietuchowska**



fotis **Gražvydas Jurgelevičius**

**La libroservo** funkcias ĉiutage 10.00 – 12.30 kaj 14.00 – 18.00 en la aŭditorio 107

## HODIAŬA PROGRAMO

**Ĵaŭdo, la 10-a de julio**

| | |
|---|---|
| **09.00 – 10.30** | Matenmanĝo (memstare) |
| **10.00 – 11.00** | Prelego de prof. Ilona Koutny: "Kolora lingva bildo de la mondo" (*Senata salono*) |
| **11.00 – 12.00** | Prelego de prof. Mark Fettes: "La konsoloj de lingvo-amanto" (*Senata salono*) |
| **11.00 – 12.00** | Prelego de Arno Lagrange: "Stefan Zweig – eŭropa verkisto" (*aŭditorio 403*) |
| **11.00 – 13.00** | Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (*aŭditorioj: A1/A2 – 306, B1 – 406, B2 – 404, C1 – 405, paroliga – 212*) |
| **12.00 – 13.00** | Baza kurso de la litova lingvo. Gvidas Severija Marija Banaitytė (*aŭditorio 401*) |
| **12.00 – 13.00** | Tria prelego de prof. Amri Wandel pri astrofiziko (*Senata salono*) |
| **13.00 – 14.30** | Komuna organizita tagmanĝo |
| **15.00 – 16.00** | Spektaklo de Birutė Prekevičiūtė *Litovio de Barbora* (*Teatra salono*) |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de prof. Laura Brazzabeni: "Instruado de Esperanto en sinkronaj kaj nesinkronaj kursoj" (*aŭditorio 306*) |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de Ulrich Matthias: "Esperanto kaj anima frateco" (*aŭditorio 404*) |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de Başak Aray: "La turka lingvoreformo" (*aŭditorio 403*) |
| **15.00 – 16.30** | Filmo de Aleksej Salomatov: *Verda Saliko* (*aŭditorio 401*) |
| **16.30 – 17.45** | Spektaklo de Mario Migliucci: *Doktoro Esperanto* (*Granda salono*) |
| **17.30 – 19.00** | Vespermanĝo (memstare) |
| **18.30 – 19.00** | Lingva ludo "Komprenu min!" kun Mikaelo Lineckij (*aŭditorio 306*) |
| **18.30 – 19.00** | Prezento de Paola Tosato: Orientaj dancoj (*Granda salono*) |
| **19.00 – 21.00** | Koncerto de Kjara (*Granda salono*) |

## Premio Maertens – por evoluigo de la E-movado

Se vi trafosis vian kongresan sakon, vi eble rimarkis informfolion pri la Premio Maertens, lanĉita en 2024 por marki la 100-jariĝon de Grégoire Maertens, prezidanto de UEA en la jaroj 1980–1986. La premio celas honori “esperantistajn organizaĵojn aŭ individuojn, kiuj per siaj realigoj grave kontribuis kaj plukontribuos al la evoluigo de la Esperanto-movado”. Ĝin prizorgas malgranda grupo de eksaj UEA-prezidantoj kaj aliaj longtempaj aktivuloj de la movado.
Iu ajn povas proponi kandidatojn por la Premio Maertens, aŭ kontribui al la kapitalo el kiu oni pagas la premion. Kial fari tion? Nu, venu al unuhora sesio pri la temo, vendredon je 10.00 en aŭditorio 401. **Mark Fettes** kaj **Michela Lipari**, anoj de la juĝkomisiono, kundiskutos kun **István Ertl** pri la premia celo kaj ĝia funkciado – ekzemple, kion povas signifi “evoluigo de la Esperanto-movado”? kion oni elstarigu en la kandidatigoj? kiel oni decidis pri la unua premiito, Stela Besenyei-Merger? ktp. Ĉiuspecaj demandoj kaj sugestoj, kiel diskonigi la premion kaj stimuli kandidatigojn, estos bonvenaj.

**Mark Fettes**

## Lingva ludo kun Mikaelo “Komprenu min!”

Laŭ la hieraŭa anonco, hodiaŭ komenciĝas la lingva ludo kun Mikaelo Lineckij sub la nomo “Komprenu min!” Ĝi konsistos el tri partoj, kiuj okazos tri sinsekvajn vesperojn. Por sabato estas planita la granda finalo. Gajnintoj de la finalo ricevos premiojn. Se vi interesiĝas pri partopreno – vi povas ankoraŭ anonci vin al Mikaelo Lineckij. Sed vi rajtas veni ankaŭ en la rolo de spektanto kaj aplaŭdi viajn ludantajn amikojn, ĉiuj estas bonvenaj!
**La unua eldono de la ludo okazos hodiaŭ je 18.30 en aŭditorio 306.**




## Dokumenta filmo pri Verda Saliko

Aĝo ne estas malhelpo por 80-jara finna virino vivi aktivan kaj interesan vivon. Raita, kio signifas en la finna “saliko”, verkas artikolojn por E-revuoj, partoprenas kiel volontulo en la Universala Kongreso en Lahti, prizorgas siajn ŝatatajn florojn en la loĝejo, montras al la eksterlandaj gastoj la somer-domon kun ĝardeno apud la Finna Golfo...

**La dokumenta filmo de Aleksej Salomatov *Verda Saliko* (83 minutoj) estos prezentita hodiaŭ je 15.00 en aŭditorio 401.**

Morgaŭ kaj sabaton sekvos du pliaj filmoj:
– *Neforgeseblaj momentoj de la UK-2024 en Aruŝo, Tanzanio* (60 minutoj)
– *Lastaj respektoj* (39 minutoj, kun subtekststoj en Esperanto)

## PROGRAMŜANĜOJ

· La spektaklo de **Mario Migliucci** *Doktoro Esperanto* okazos en la Granda salono.
· Al la programo estas aldonita prezento pri la Premio Maertens, al kiu kontribuos **Mark Fettes**, **Michela Lipari** kaj **István Ertl**. Ĝi okazos morgaŭ je 10.00 en aŭditorio 401. Pliajn informojn serĉu sur p. 2.
· **Manfred Westermayer** prelegos vendredon du fojojn. La unua prelego, origine planita por sabato, okazos je 11.00; la dua – je 15.00.

## INFORMOJ

# Adiaŭa vespero atendas viajn kontribuaĵojn

Se vi volas ricevi grandan plezuron de la adiaŭa koncerto, mi petas vin reeĥi ĉi tiun alvokon kaj aktive kontribui al la programo. Mi suspektas, ke multaj el vi estas ege talentaj en diversaj branĉoj, do fanfaronu pri tio, kion vi scipovas: kanti, danci, deklami, pantomimi, eĉ arte silenti! Bonvolu kapti min en ajna loko kaj enmanigi papereton, sur kiu estos informo pri via(j) konribuaĵo(j)!

Malpacience atendanta la proponojn,
**Mikaelo Lineckij**

Ĉu vi havas belan foton el BET? Raporton pri kunveno? Aŭ eble ion interesan por rakonti? Ne hezitu sendi vian kontribuaĵon! **@kunfluo**

# Disko de Lucio Avitabile aĉetebla en la libroservo

Hieraŭ vespere Lucio Avitabile por la unua fojo koncertis antaŭ Esperanta publiko. Li kantis ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en kelkaj aliaj lingvoj. Lia KD titolita *Esper(k)anto* estas ekde nun aĉetebla ankaŭ en la libroservo de BET. **Speciala prezo nur dum BET: 10 €**




## MORGAŬA PROGRAMO

| | **Vendredo, la 11-a de julio** |
|---|---|
| **09.00 – 10.30** | Matenmanĝo (memstare) |
| **10.00 – 11.00** | Prelego de prof. Ilona Koutny: “Universitata instruado de Esperanto” (*Senata salono*) |
| **10.00 – 11.00** | Prezento pri la Premio Maertens. Kontribuas Mark Fettes, Michela Lipari, István Ertl (*aŭditorio 401*) |
| **11.00 – 12.00** | Invito al interlingvistiko. Gvidas prof. Mark Fettes (*Senata salono*) |
| **11.00 – 12.00** | Prelego de Manfred Westermayer: “Milito kaj klimato kun ekologio” (*aŭditorio 403*) |
| **11.00 – 13.00** | Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (*aŭditorioj: A1/A2 – 306, B1 – 406, B2 – 404, C1 – 405, paroliga – 212*) |
| **12.00 – 13.00** | Prelego de Aida Čižikaitė: “Famaj nomoj de la litova kulturo” (*aŭditorio 403*) |
| **12.00 – 13.00** | Baza kurso de la litova lingvo. Gvidas Severija Marija Banaitytė (*aŭditorio 401*) |
| **13.00 – 14.30** | Komuna organizita tagmanĝo |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de prof. Laura Brazzabeni: “Disvastigo de Esperanto per radio” (*aŭditorio 306*) |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de Ulrich Matthias: “Esperanto en Afriko” (*aŭditorio 404*) |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de Manfred Westermayer: “Marĉoj” (*aŭditorio 401*) |
| **16.30 – 17.30** | Prelego de Ite Tytgat: “Vitaminoj – esencaj eroj en nia nutrado” (*aŭditorio 403*) |
| **17.30 – 19.00** | Vespermaĝo (memstare) |
| **18.30 – 19.00** | Lingva ludo “Komprenu min!” kun Mikaelo Lineckij (*aŭditorio 306*) |
| **19.00 – 21.00** | Prezentaĵo de Mario Migliucci kaj Kjara (*Granda salono*) |

## ALTERNATIVAJ EKSKURSOJ

Ankaŭ la BET-anoj kiuj ne partoprenis la tuttagan ekskurson tre kreeme kunmetis sian merkredan programon. Dekduo da personoj vizitis la muzeon pri Juozas Zikaras, kiu troviĝas en lia iama domo apud la Striga Monteto. Li estas la aŭtoro de la fama Monumento de Libereco kiu troviĝas tuj apud la ĉi-jara BET-ejo. Aliaj iris ekzemple al la monaĥinejo Pažaislis, en kiu loĝas ankoraŭ kvin monaĥinoj. Tre interesa loko, sed ne vere turisma; necesis piediri tien ĉ. 1,5 kilometrojn.

## TUTTAGA EKSKURSO

fotis **Gražvydas Jurgelevičius**



La tuttaga ekskurso – iom da ĝuo kaj iom da kleriĝo.



En la muzeo de la natura rezervejo.



La glaciaĵ-torto forgesigis la veteron.

## FINANCA SUBTENANTO DE BET-59

iniciatyvos KAUNUI

## FOTOJ DE LA TAGO(J)

fotis **Gražvydas Jurgelevičius**



Gaja etoso en la publiko.



Neformala interkonsiliĝo de artistoj.



Lucio Avitabile kantis unuafoje por esperantistoj.

**KUNFLUO** estas ĉiutaga informilo de BET-59. Redaktoro: Paweł Fischer-Kotowski, ✉ **kunfluo@proton.me** Kontaktu la redakcion ankaŭ per SMS aŭ unu el la poŝtelefonaj aplikaĵoj: WhatsApp, Telegram aŭ Signal:

✆ **+31 6 19 46 48 37** aŭ **@kunfluo**

en Signal: @kunfluo.2025